

# Esperanto-Brno

Esperanto-Brno - Kluba prelego 7.3.2012

## Kiel Japanio apertiĝis al la mondo

Oldřich Arnošt Fischer

Japanio estas azia insula lando, kiu estas setlita de propranaturaj homoj kaj havas interesan historion. Ĝi situas sur insuloj *Honŝŭ*, *Hokkaidó*, *Ŝikoku*, *Kjŭŝŭ* kaj multe da pli malgrandaj insuloj. En nordo estas Kurila arĥipelago kaj en sudo estas arĥipelago *Rjŭkjŭ*, kies la plej granda insulo estas *Okinawa*. Sed antaŭ 120 mil – 12 mil da jaroj Japanio estis parto de azia kontinento kaj homoj kaj bestoj povis Japanion prisetligi el ambaŭ norda kaj suda direktoj. El nordo migris ekzemple mamutoj, gulo kaj ursoj, el sudo simioj kaj elefantoj de *Naumann*. Kiam degelis glacimontoj, maro inundis parton de la kontinento kaj Japanio fariĝis arĥipelago. Nordon de Japanio, precipe insulon *Hokkaidó*, malvarmigas marfluo *Ojaŝio* kaj sudo de Japanio estas varmigita de varma marfluo *Kuroŝio*. Tial Japanio estas lando de kontrastoj (COLLCUTT k.a. 1997). En japana sudo estas varma kaj modera klimato, sed en nordo estas malvarma klimato. Neniu scias de kie japanoj alvenis, sed laŭ ilia lingvo ili verŝajne devenis el Siberio kaj miksiĝis kun pacifikaj insulanoj. En Japanio loĝas originaj ne-japanaj loĝantoj, nacio *Ainu*, kiuj estis de japanoj elpuŝitaj en nordan insulon *Hokkaidó*-n, kaj nacio *Rjŭkjŭ*, kiu loĝas sude, precipe sur insulo *Okinawa*.

Japanio devas importi kelkajn krudmaterialojn, kiuj mankas en insuloj. Antikvaj japanoj havis bonajn kontaktojn kun Ĉinio kaj Koreo. Jam en la sesa jarcento japanoj akceptis ĉinajn karakterojn, kiujn uzadis en japana skribo. Ĉinoj skribis pri japanoj kiel pri nacio *Wa*. **(Bildo 1)** Tiun nomon *Wa* ili skribis uzante karakteron „liliputano“. Tio kompreneble ofendis japanojn, kiuj antaŭ karakteron „liliputano“ ekskribis karakteron „granda“ kaj ambaŭ karakterojn eklegis „*Jamoto*“. Poste, en la oka jarcento, ĉinoj kaj japanoj ekskribis nomon de Japanio uzante karakterojn „Suno“ kaj „komenco“. Japanoj tion legis „*Nihon*“ aŭ „*Nippon*“ („Leviĝanta suno“). Kun karaktero „lando“ tio estis „*Nippon kuni*“ („Lando de leviĝanta suno“). (KROUSKÝ kaj ŠILAR 1993, NEVEROVA k.a.1990). Ĉinoj legas tiujn tri karakterojn „*Ĵpen kuo*“. Kiam venecia komercisto Marco Polo vizitis Ĉinion, li aŭdis rakontojn pri orienta insula lando *Ĵpen kuo*. Li eldonis vojaĝpriskribon „*Miliono*“ (1299), kie rakontis pri lando „*Ĉipango*“ (kripligita *Ĵpen kuo*) (TICHÁ 1984). Tial nomo de Japanio estas simila en multe da lingvoj (JANOŠ 1986).

Mezepoka Japanio konzistis de multe da princoj. Japanaj princoj (*daimjŭ*) ofte batalis unu kontraŭ alia por novaj teritorioj. Sed kiam Japanion atakis mongoloj en la jaroj 1247 kaj 1281, tuta lando unuiĝis por komuna defendo. En la dua mongola atako partoprenis 150 mil da batalantoj, kiujn sendis mongola *Kublajĥano* kontraŭ fieraj insulanoj. Tiam Japanion savis tajfuno (*kamikaze* – dia vento) **(Bildo**

2), kiu detruis invadajn mongolajn-koreajn militŝiparojn (KROUSKÝ, I. (1986).

Ekde la 9-a jarcento Japanio havis interesan regadon (**Bildo 3**). Japanio estis imperio (*teikoku*), sed imperiestro (*tennó heika*) neniam regis. Anstataŭ la imperiestro regis super tuta Japanio regento (*kampaku*). (En ĉeĥa historio estis fama regento Georgo de *Poděbrady* (1420 – 1471) kiu estis regento de juna Ladislao Postumo en la jaroj 1453 – 1457 (HORA-HOŘEJŠ 1995). Sed en Japanio regentoj regis ankaŭ anstataŭ adultaj homoj.) Militan potencon havis militestro (*ŝógun*). Tial Japanio havis tri regantojn: imperiestron, regenton kaj *ŝógun*-on.

Dum la dekseca jarcento kaj komenco de la sepdeka jarcento tri elstaruloj unuigis Japanion. Tio estis necesa, ĉar en la jaro 1500 tuta lando estis dividita inter pli ol 250 princejoj. La elstaruloj devenis de malgranda nobelaro, unu de ili, *Hidejoŝi*, estis eĉ kamparano, sed ili ĉiuj havis grandajn militestrajn kapablecojn (VASILJEVOVÁ 1986, TURNBULL 1994). La unua unuiganto de Japanio estis *Oda Nobunaga* (1534 – 1582), kiu malfortigis influojn de *dajmjó* kaj monaĥejoj. (Budhanaj monaĥejoj estis fortikaĵoj kaj monaĥoj estis batalemaj kaj bone armigitaj.) Iu *Nobunaga*-n mortigis, sed alia bonega militestro, *Hidejoŝi*, kontinuus unigi Japanion.

*Tojotomi Hidejoŝi* (1536 – 1598) devenis el kamparana familio. Li servis al *Nobunaga* kaj fariĝis stratego. Li nesukcese volis aneksi Koreon, sed sukcese batalis kontraŭ piratoj. Kiam li volis superi *Okinawa*-n, ordonis konfiski ĉiujn glavoj de indiĝenaj loĝantoj dirante, ke li volas ordoni fari de glava ŝtalo statuon de *Buddha*. Tiu „glavĉasado“ (*katanahari*) devigis loĝantojn de *Okinawa* esplori karateon, batalon sen armiloj (FUNAKOŠI 1994).

*Iejasu Tokugawa* (1542 – 1616) venkis princojn kaj fariĝis ŝoguno de tuta Japanio.

Kiam komencis kontaktoj de japanoj kun eŭropanoj? En la jaro 1543 malgranda portugala ŝipo kun tri portugalaj maristoj estis trovita en insuleto *Tanegaŝima*. La maristoj ekvidis novan, interesan landon, japanajn profesiajn batalatojn – samurajojn kaj ĉarmajn japaniojn. Tiuj japanioj tre plaĉis al la maristoj, sed la maristoj ne plaĉis al gejapanoj. Eŭropanoj estis altstaturaj, havis longajn nazojn, estis tre bruaj, manĝis multe da viando kaj ne ŝatis lavadi ilin kaj tial fiodoris. Sed la maristoj havis fusilojn! Japanaj *daimjó* aĉetis tiujn fusilojn, kopiis ilin kaj komencis rapide fabriki fusilojn por iliaj armeoj. Tre grava estis ankaŭ teĥnologio de fabrikado de pulvo. Jam ĉinoj, koreoj eĉ mongola *Ĉingišĥano* sciis pulvon, sed ili neniam kapablis inventi propran fusilon. Kial? La pulvo estas miksaĵo de karba kaj sulfura polvoj kun nitratoj ( $NaNO_3$ ,  $KNO_3$ ,  $(NH_4)NO_3$ ). Se oni fajrigas nur sulfuron kun karbo, la miksaĵo brulas malrapide. Sed se oni aldonas nitratojn, kiuj donas al la miksaĵo amason da oksigeno, la miksaĵo ekbrulas rapide, eksplodas. Principo de pulvo estas miksaĵo de brulantaj substancoj (fonto de energio) kaj riĉa fonto de oksigeno – nitratoj. Ĉinoj fabrikis pulvon, sed ili ne purigis nitratojn. Tial ĉina pulvo estis neefika, oportuna nur por amuza pirotekniko. Eŭropanoj ekde la 14-a jarcento purigis nitratojn kaj fabrikis kvalitan pulvon. (En nia historio husanoj subgvide fama militestro Johano Jiĵka de *Trocnov* (? – 1424) ofte kaj sukcese uzadis paflegojn, bazkojn, haŭbizojn kaj primitivajn fusilojn.) Japanoj eklernis fabriki kvalitan pulvon kaj jam en la jaro 1600 en batalo apud *Sekigahara* batalis unu kontraŭ alia du japanaj armeoj kun japanaj fusiloj. (Batalo apud *sekigahara* estis lasta batalo necesa por

unuigo de Japanio. *Tokugawa* tie venkis filon de *Hidejoŝi*.) Kapableco de japanoj kopii ĉion estas fama. Eĉ nuntempe japanoj kopias novaĵojn en tuta mondo.

En la dekseca jarcento eŭropaj komercistoj volis komerci kun japanoj. Tial portugalaĵoj (1545) kaj hispanaj (1584) komercaj ŝipoj albordiĝis en japanaj havenoj *Hirado* kaj *Nagasaki*. Poste ankaŭ angloj kaj nederlandanoj ekkomercis. Kune kun komercistoj alŝipis portugalaĵoj kaj hispanaj romkatolikaj misiistoj. La plej fama misiisto estis Francisko de *Havjer* (1509 – 1552). Nuntempe li estas unu de romkatolikaj sanktuloj. Li estis basko, studadis en Parizo kaj en la jaro 1529 renkontiĝis tie kun handikapula samklasano, Ignaco de *Lojola*. Ignaco estis ankaŭ basko kaj dum milito kontraŭ francoj, kiuj sieĝis kastelon *Pamplona* (1521), pafilega projektilo vundis liajn piedojn. Vundita *Lojola* pensis pri kredo kaj ekrevis pri nova, bonege organizata monaĥeja ordeno. *Lojola* havis grandegan ĥarismon. En la jaro 1534 li kun Francisko kaj kelkaj aliaj samklasanoj fondis novan ordenon – Jezuitan ordenon (1534 – 1773). Celo de la ordeno estis disvastigado de kristanismo en tuta mondo. Jezuitoj estis tre laboremaj kaj edukitaj homoj kun disciplino, kiu estis eĉ simila al armea disciplino. En la jaroj 1541-1542 Francisko veturis en Indion. Lia vojo estas longa, malrapida (propter Afriko, el havano al alia haveno) kaj daŭris preskaŭ unu jaro. Sur ferdeko de portugala komerca ŝipo ne ŝipiris nur komercistoj kaj misiistoj, sed ankaŭ diversaj aventuruloj, kiuj volis komenci novan vivon malproksime de Eŭropo. Portugaloj fondis komercajn bazojn en india porto *Góa* (1510) kaj ĉina porto *Makao* (1557). En *Góa* studadis misiistoj, kiuj volis labori en Asio. Ili studadis orientalajn lingvojn, ĉar ilia tasko estis malfacila. Misiisto devis ne nur flue paroli, sed prediki en orientalaj lingvoj, favorigi al indiĝenoj kristanismon, baptizigi ilin kaj eduki indiĝenajn pastrojn. En la jaro 1549 Francisko veturis en Japanion. Unu ĉina pirato transportigis lin trans maro kaj poste Francisko iradis piede, predikis kaj baptigis japanojn. Indiĝenoj ofte mokis, ke li estis malriĉa, sed Francisko diris al ili japana „*O-kami wa ainari!*“ („La Dio estas la amo!“) (HILSKÁ 1953). Japanioj, kiuj estis ŝintoanoj aŭ budhanoj, neniam aŭdis tion. Vilaĝanoj, kiuj sciis nur laboregon kaj travivis civitajn militojn, rapide ekkomprenis rakonton pri Jesuo kristo, kiu oferas al homoj pli multe ol tiu fiera kaj malriĉa mondo. Ne nur malriĉuloj, sed ankaŭ kelkaj nobeloj, *daimjô*, kristaniĝis. Francisko, malriĉa kaj ofte malsata, sukcesis baptigi ĉirkaŭ 500 japanojn. Kiam li revenis en Indion, li mortis en insulo proksime Kantono. Multe da aliaj misiistoj preparis en *Góa* kaj nombro da japanaj kristanoj kreskis. En la jaro 1582 estis en Japanio jam 150 mil kristanoj kaj estis konstruitaj 200 preĝejoj. En la jaroj 1583 - 1591 kvar japanaj kristanaj nobeloj vizitis roman papon en Eŭropo.

Japanoj havis multe da religioj. La unua estis animismo, poste evoluis ŝintoismo kaj poste japanoj akceptis budhismon. Eŭropanoj estis kristanoj. Japanaj ŝintoanaj kaj budhanaj pastroj rapide ekkonis konkurencon kaj ekbatalis kontraŭ kristanoj. Ili rekonis, ke kristaj pastroj uzadas ofte latinan vorton „Deus“ („la Dio“), kiu estas simila al japanaj vortoj „*dai uso*“ („granda mensogo“)(ENDÓ 1987).

*Hidejoŝi* ektimis de jezuita influo kaj eldonis en la jaro 1587 la unuan kontraŭkristanan dekretan. En la jaro 1596 li eĉ ordonis ekzekuti ses misiistojn kaj 24 japanajn kristanojn. Ankaŭ ŝoguno *Iejasu Tokugawa* kruele persekutis kristanojn. En la jaro 1613 *Cunenaga Hasekura* kun japanaj senditoj sukcese ŝipveturis en

Meksikon kaj poste sur hispana ŝipo en Hispanion, sed kiam li revenis, ĉiuj senditoj devis rezigni kristanecon. En tiu jaro estis en japanio 2 % da kristanoj. Ĝis la jaro 1635 ŝoguna reĝimo ordonis ekzekuti 280 mil da kristanoj. Ekde la jaro 1616 estis japanaj portoj krome *Hirado* kaj *Nagasaki* fermitaj al eksterlandanoj. En la jaro 1639 devis forlasi Japanion ĉiuj portugaloj kaj en la jaro 1641 nederlandanoj. Nur dek nederlandaj oficistoj povis labori en *Deĝima* kiel reprezentantoj de Orientinda kompanio (fondita en la jaro 1600).

En batalo apud kastelo *Ŝimabara* (1637) falis multe da japanaj kristanoj kaj nekristanaj kamparanoj, kiuj ankaŭ ekribelis kontraŭ tiranismo de reĝimo (**Bildo 4**).

*Iejasu Tokugawa* en la jaro 1610 Japonion izolis ne nur kontraŭ eŭropanoj, sed ankaŭ kontraŭ aziaj influoj. Regado de *Tokugawa* estis absolutisma kaj despota. Japanoj, kiuj en momento de izolado estis eksterlande, jam neniam povis reveni en Japanion. Japanoj, kiuj volis elveturi, ne devis elveturi. Kiu sciis aŭ volis lerni fremdajn lingvojn, estis suspekta. Kiu ricevis eksterlandan poŝtaĵojn aŭ nur ekbabilis kun iuj eksterlandanoj, estis suspekta. Vilaĝanoj estis organizitaj en grupoj da kvin personoj (*goningumi*) kaj denunciis unu la alian. (Tio rememorigas al ni ion, ĉu ne?) Se iu estis suspekta, li estis ekzamenita, eĉ kruele torturita. Se oficistoj volis ekkoni, ke suspekta persono ne estas kristano, ili ordonis al li aŭ kraĉi aŭ treti sur kruco aŭ bildo de Jesuo Kristo aŭ la Virgulino *Maria*. Tiu ekzameno nomiĝis *fumie*. Japana kristana verkisto *Ŝusaku Endó* bonege priskribis persekvadon de japanaj kristanoj en novelo „Silento“ (japane: *Ĉimmoku*, ĉeĥe: *Mlčení*) (ENDÓ 1987).

Principo de izoleco gvidis al stagno. Vane rusaj kaj nederlandaj diplomatoj provis kontaktigi japanojn.

En la jaro 1853 aperis proksime ĉefurbo *Edo* (nuntempa *Tókjó*) usonaj militŝipoj. Post kelkaj vanaj provoj kontakti japanan registraron, usona komodoro *Matthew Perry* ordonis celi militŝipajn pafilegojn sur palaco de *ŝogun*. Kaj Japanio apertiĝis al la mondo! *Perry* sukcesis transdoni al la *ŝogun* leteron de usona prezidento kaj promesis, ke post unu jaro li revenos por respondo. En la jaro 1854 li revenis. Tio gvidis al gravaj ŝanĝoj en japana societo. En la jaro 1868 juna imperiestro *Mucubito* prenis novan nomon „*Mejĝi*“ kaj komencis reformon de Japanio, Reformon *Mejĝi* (*Mejĝi iŝin*)(**Bildo 5**). Kontraŭ tiu reformo protestis kaj kelkfoje eĉ ekribelis samurajoj, kiuj perdis iliajn privilegiojn. Kelkaj eksterlandanoj eĉ estis en Japanio mortigitaj (JANOŠ 1986). Sed la reformo kontinuis. Japanoj forlasis mezepokajn vestojn kaj ekportis europeskajn vestojn kaj uniformojn. Kelkaj samurajoj komencis entrepreni kaj industriis landon. Negoco kun eŭropo kaj usono renoviĝis (ROBERTS, 2000ab).

Eŭropanoj kaj usonanoj eksciis japanan kulturon kaj japajajn kutimojn (URBANOVÁ 2004). Ankaŭ japana poŝta sistemo estis reformita. La unuaj japanaj poŝtmarkoj estis eldonitaj jam en la jaro 1871 (JANOŠ 1986) (**Bildo 6**, **Bildo 7**). Samurajoj interesiĝis pri armeajn novaĵojn. Ankoraŭ antaŭ la I-a mondmilito Japanio fariĝis agresema ŝtato (**Bildo 8**). En la jaro 1876 japanoj devigis koreojn fari malprofitan kontrakton. Dum la jaroj 1894-1895 japanoj batalis kontraŭ Ĉinio kaj akiris insulon *Thaj-van*. Dum la jaroj 1904-1905 Japonio venkis Ruslandon kaj akiris portojn *Port Arthur* kaj *Dal'nyj*. Kaj en la jaro 1910 japanoj aneksigis Koreon (COLLCUTT k.a. 1997).

En Japanio ĉiam alternis ondoj de nekritika admiro eŭropa kaj usona kulturoj kun ondoj de rifuzado (JANOŠ 1986).

Interesajn kontaktojn japanoj kun ĉeĥa kultro vi povas trovi en libro de japana bohemisto kaj esperantisto *Kurisu Kei* „Kion donis al mi ĉeĥa literaturo“ (KEI 1996) (**Bildo 9**).

Malgraŭ multaj eksterlandaj influoj Japanio konservis siajn ĉarmojn kaj misteriojn.

## Referencoj

- COLLCUTT, M., JANSEN, M. & KUMAKURA, I. (1997): Svět Japonska. 1-a eld., Prago, Knižní klub, 240 paĝoj.
- ENDÓ, Š. (1987): Mlčení. 1-a eld., Prago, Vyšehrad, 200 paĝoj.
- FUNAKOŠI, G. (1994): Karatedó, má životní cesta. 1-a eld., Prago, Naše vojsko, 75 paĝoj.
- HILSKÁ, V. (1953): Učebnice hovorového jazyka japonského. 2-a eld., Prago, Nakladatelství Československé akademie věd, 445 paĝoj.
- HORA-HOŘEJŠ, P. (1995): Toulky českou minulostí, volume 2, 2-a eld., Prago, Baronet, 454 paĝoj.
- JANOŠ, J. (1986): 99 zajímavostí z Japonska. 2-a eld., Prago, Albatros, 288 paĝoj.
- KEI, K. (1996): Co mi dala česká literatura. 1-a eld., Dobřichovice, Kava-Pech, 31 paĝoj.
- KROUSKÝ, I. (1986): Učebnice japonštiny, volume 1, 4-a eld., Prago, Státní pedagogické nakladatelství, 263 paĝoj.
- KROUSKÝ, I. & ŠILAR, F. (1993): Japonsko-český slovník. 1-a eld., Prago kaj Litomyšl, Paseka, 467 paĝoj.
- NEVEROVA, N.D., NOZDREVA, R.B., ROZANOVA, T.A. & TARASOVA, T.I. (1990): Kratkij japonsko-ruskij slovar ieroglifov. 2-a eld., Moskvo, Russkij jazyk, 410 paĝoj.
- ROBERTS, J.M. (2000): Ilustrované dějiny světa, volume VI. Vývoj evropské civilizace. 1-a eld., Prago, Euromedia Group - Knižní klub kaj Balios, 192 paĝoj.
- ROBERTS, J.M. (2000): Ilustrované dějiny světa, volume X. Nový světový řád. 1-a eld., Prago, Euromedia Group - Knižní klub kaj Balios, 192 paĝoj.
- TICHÁ, Z. (1984): Cesta starší české literatury. 1-a eld., Prago, Panorama, 304 paĝoj.
- TURNBULL, S. (1994): Nindža. Kult japonského tajného boje bez příkras. 2-a eld., Prago, Naše vojsko, 160 paĝoj.
- URBANOVÁ, J. (2004): Brněnští mariňáci. 1-a eld., Brno, Barrister & Principal, 155 paĝoj.
- VASILJEVOVÁ, Z. (1986): Dějiny Japonska. 1-a eld., Prago, Svoboda, 604 paĝoj.

Aŭtoro dankas al samideanino Jarmila Handlová por belegaj nuntempaj japanaj poŝtmarkoj (**Bildo 6**, **Bildo 7**).

Pri nomo de Japanio

和	WA
大和	JAMATO
日本	NIHON, NIPPON
日本国	NIPPON KUNI (Ĵ'PEN KUO)

Bildo 1

Dia vento (*kamikaze*) – 1247, 1281

神	KAMI
風	KAZE


Bildo 2

Regado en mezepoka Japanio



Bildo 3

Ŝūsaku Endō: Silento (1966) – novelo pri japanaj kristanoj



Bildo 4

Reformo Meĵi (Meĵi iŝin)

Antaŭ la reformo	Post la reformo
1 - SAMURAJOJ	1 - NOBELOJ ( <i>kazoku</i> )
2 - TERKULTURISTOJ	2 - SAMURAJOJ ( <i>ŝizoku</i> )
3 - METIISTOJ	3 - ORDINARULOJ ( <i>hejmin</i> )
4 - KOMERCISTOJ	
5 - („NEHOMOJ”, <i>hinjin</i> )	

明	MEI
治	ĜI
維	I
新	ŜIN

Bildo 5

Japanaj poŝtmarkoj (ekde la jaro 1871)



Bildo 6

Japanaj poŝtmarkoj (teksto: *Nippon jūbin* - Japana poŝto)



Bildo 7

Japanaj agresoj antaŭ la I-a mondmilito

**1876** – Japanio devigis Koreon fari kontrakton kun Japanio, kiu estis tre malprofita por Koreo;

1894-1895 – milito kontraŭ Ĉinio (Japanio akiris *Tĥaj-vanon*);

1904-1905 – milito kontraŭ Ruslando (Japanio akiris havenojn *Port Arthur* kaj *Daŭnyj*);

1910 – aneksado de Koreo.

Bildo 8

Libro de japana bohemisto kaj esperantisto Kurisu Kei



Bildo 9